



speciala poezia numero

La printempo de l' poetoj 2026



Karaj gelegontoj,

Laŭ ĉiujara kutimo Esperanto-Gironde dediĉis la posttagmezon de sia marta monata grup-kunveno al legado de poemoj en Esperanto, kadre de la tutlanda poezia evento. Ĉijare la temo estis:

Libereco, vigila ŝvebanta forto

Tiun liberecon jam sopiris la Ĝirondiaj deputitoj dum la Franca Revolucio kaj tial ĝia alegorio rompis la ĉenojn kaj fiere staras, preta por forflugi, super la monumento de la placo Quinconces.

Libereco hodiaŭ plu gravas por ni, membroj de nia loka E-asocio, kaj per tiu interŝanĝo de poezioj, ni ne nur klerigas unu la alian sed ĉefe luktas kontraŭ la minaco iam perdi tiun ŝatatan liberecon.

Kaj la fontoj esploritaj de ĉiuj partoprenintoj atestas ĝuste pri la valoro de poezio el diversaj originoj, kaj precipe el mondopartoj, kie popoloj suferas pro subpremo kaj manko de libero. Tiel aŭtorinoj el Irano, Ukrainio, aŭ Afganiŝtano, kiujn prezentis Klodin', Katja kaj Elvezio.

<https://e-monumen.net/patrimoine-monumental/la-liberte-monument-aux-girondins-bordeaux/>

LIBERECO DE KOLOMBOJ ORIENTA RAKONTO



Foje, vizitanto demandas la reĝon:
"Kial vi akceptas la kolombojn, se vi poste
liberigas ilin?"



"Por montri mian grandanimecon en festaj
tagoj", la reĝo respondis.



Per kapmovo la reĝo
konsentis, ke tiuj
observoj estas tre pravaj.

Estis antikva regno, kie la popolo tradicie
kutimis donaci al la reĝo kolombojn
grandkvante, por ke li liberigu ilin. Kaj la
donacintoj ricevis rekompencon.



Kaj la homo plu diris:
Por donaci al vi tiujn kolombojn, miloj da homoj
ĉasadus la kompatindajn birdojn. Multaj
mortas. Por montri grandanimecon, ĉu ne
estus oportune malpermesi la ĉasadon? Tiel vi
efektive protektus ilin. Vi ne atentus pri la
malbono, kiun vi kaŭzas al ili."

"Por Komencantoj" - septembro 2007
Brazilo Esperanto-Ligo

Libereco de Kolomboj
Teksto redaktita de
Paulo Sérgio Viana



Bildoserio de Liette Léla

Menciindas ke plej multaj el la fotoj de tiu revuo fotis Katja kaj Klodin'.

titolo	aŭtoro	prezentas	paĝo
protokolo de kunveno 29/03	Marcelo		3
Neniu mano ekzekutos nian liberecon	Mahtab Ghorbanii	Klodin'	8
Contra spem spero!	Lesja Ukrajinka	Katja	11
La Misvojo	Fernando Redondo Ituarte	Seán	14
Kongresa runo	K. Kalocsay	Seán	16
Libero	K. Kalocsay	Olivier	17
La rozo	R. Schwartz	Rose	18
Plej facila sur la tero	R. Schwartz	Bernardo	18
Filino el Afganistano	Nadja Anjuman	Elvezio	19
Ĉiamverda arbo	Kim Min-gi	Choe Taesok Marcelo	21
Matena roso	Kim Min-gi	Choe Taesok Marcelo	21

Protokolo de la **grupkunveno okazinta la 29an de marto 2026**
en la salono de Toktukaŭ en Pesako

Ĉeestis: Ĵanseb Brilleaud, Elvezio Canonica, Katja Gradzion, Olivier Moreno, Seán Ó Riain, Klodin' Pomiro kaj Marcelo Redulez, Bernardo kaj Rose Sarlandie, Eric Tiffon.

Senkulpigitaj: Luca Buselli, Janine kaj Yannick Dumoulin, Gloria Gargallo, Hervé Giranton, Joël Lajus, Jean-François Seyler.

Ĵanseb pri la nomo de la hodiaŭa rendevuejo *Toctoucau*: En frua tempo ĉevaloj tro rapide kuris, la stiristoj de la ĉaroj kriis "Toque tout caou!" signifante "Piku la ĉevalon tute dolĉe", instigante al malrapido por ne provoki akcidenton.

Elvezio: memorigas ke nia venonta kunveno okazos **denove en tiu sama bela salono de Toctoucau, dimanĉon, la 26an aprilo.**

Temos tiam pri la jara **Ĝenerala Kunveno.**

Georges Brassens en Esperanto finfine staras en sia hejmo sur esperanta breto en la Universita Biblioteko.

Eriko vendis unu kroman per E-bay. **Marcelo** kaj **Klodin'** transdonis al **Blaise Guinin**, la ilustrinto, liajn tri ekzemplerojn kaj vendis tri ekzemplerojn en Parizo. Ilia hejma stoko elĉerpiĝis. Ili petas ses novajn librojn.



Elvezio montras ĵus ricevitan libron **Espéranto et Espérantisme en France.**

Temas pri tezo de **Thomas Creusot**. Interesa profunda laboro. Leginda ĉar informriĉa... almenaŭ ni esperas, ĉar neniu el ni ankoraŭ legis! 😊

Eldonita en 2025 ĝi estas prezentita kiel valorajo. **Ĵanseb** trafoliuminte bedaŭras ke ne aperas (aŭ ne sufiĉe) la aktuala movado, por montri la pluan gravecon kaj ne kadukecon.

Elvezio: Christian Leduc informis pri lia KD. Bedaŭrinde mankas titolo en Esperanto.



Pri la traduko de la bildstrio de **Dominiko**: estas demandite kie eblas trovi ĝin? Vi povas elŝuti ĝin france: <https://esperanto-gironde.fr/frzapa>

Esperante: <https://esperanto-gironde.fr/eozapa>

kaj portugale: <https://esperanto-gironde.fr/ptzapa>

Ankaŭ eblas prentebaj versioj: <https://esperanto-gironde.fr/wp-content/uploads/FrZapaPrint.pdf>

kaj <https://esperanto-gironde.fr/wp-content/uploads/EoZapaPrint.pdf>

Eriko donas informojn pri la **printempa festo de la Grajneto**: Tie kun Dominiko li kunanimis E-budon. Fotoj. En la festo venis multaj homoj, inter kiuj la eksurbestro... Hurmic, kiu ne sufiĉe promesis. 😊

Nia retejo: Kiu estonteco por nia retejo, ĉar **Dominiko** esprimis sian decidon ne plu zorgi. Ekzemple LEGI baldaŭ aperos la numero. Kiu enretigos ĝin?

Eriko, ĉar li posedas aliron, proponas sin kiel volontulo por simplaj aldonoj al la retejo, ekz. la venonta LEGI. Eble **Lucas** konsentos kunhelpi, ĉar multaj el ni pli aĝaj ne kompetentas.

La kurso en la Universitato ne povis okazi lastan semajnon pro ŝloso far la prezidanto de la Universitato fronte al risko de blokado far la studentoj. La antaŭan kurson **Luca** gvidis pro neĉeesto de **Elvezio** helpe de IA... tamen atentu pri la eraroj!



Pri la retejo **Literatura Vivo**: En la freŝdata reta numero (la 10a - aprilo 2026 - 190 paĝoj!) estis publikigitaj multaj poemoj tradukitaj de honorigita **Seán**. Legu tie ankaŭ biografian noton por pli bone koni **Seán** kaj okaze de la printempo de l' poetoj, ne hezitu legi tiujn verkojn liajn.

Tiu reta revuo estas kunredaktita de paro:

Fondinto & Ĉefredaktoro: Erika Godó (Belulino), hungara esperantistino, poetino, verkistino, literatura tradukistino kaj kantotekstverkistino. Ŝi kreas muzikvideojn kaj publikigas verkojn en La Ondo de Esperanto, Monato, Penseo kaj Beletra Edeno, kun pluraj premioj en internaciaj konkursoj. Ŝi diplomiĝis en la Universitato de Miskolc (sociologio) kaj, krom la denaska hungara, parolas la anglan, italan kaj hispanan.

Kun-ĉefredaktoro — John Huang: Naskiĝinta en 1964 en Ĉinio, John Huang diplomiĝis pri fiziko en 1985, poste laboris kiel universitata preleganto kaj

publikigis librojn, inkluzive Alteduko en Kanado. Esperantisto ekde 1983, li estas prezidanto de IKEF Nordameriko, mondvojaĝanto kaj oficiala fotisto ekde 2022 ĝis nun. Li amas literaturon, tradukas kaj verkas poemojn, kunlaboras kun profesoro Vejdo pri Penseo kaj Beletra Edeno. En 2022 KEA eldonis lian unuan Esperantan libron Georgo Eklernas Esperanton. De 2023 ĝis 2025 li organizis mondskalan laŭtleĝadon de Libro de Poezio kaj kunkreis popularajn videojn. Li estas prezidanto de Internacia Ligo de Esperantistaj Fotistoj ([ILEF](https://www.ilef.org)).

Ekde 2025 jam aperis 10 numeroj abundaj kaj legendaj. Frandu literaturaĵojn ĉe <https://www.literaturavivo.com>



Marcelo sendis retmesaĝon antaŭ du tagoj rilate eldonadon de sia unua romano-propono **La valizeto 518**. Konsidere la rimarkojn de Jorgos jen propono: **Marcelo** proponas ke Esperanto Gironde akiru 10 ekzemplerojn po 5€. La unuopa prezo kostos 8€; ekde 5 ekzempleroj -30% (5,60€); plus unu senpaga por 10 ekzempleroj kaj tri senpagaj por 20 ekzempleroj menditaj.

Bernardo demandas kial nur 10? Kial ne 20? Grupa unuanima decido (minus du sindetenoj): mendo de 20 ekzempleroj kaj kontraŭ 112€ Esperanto-Gironde ricevos 23 vendotajn librojn. La vendoprezon la grupo decidos poste.

Seán parolas pri la agado E-o 140-jara en 2027! Ses generacioj! Nova kampanjo de UEA por publikigi tiun eventon kaj informi publikon. Ĉies iniciatoj bonvenas. Jam antaŭvideblas ankaŭ 150 en 2037. Simpla slogano **ESPERANTO 140**. Esperanto-Gironde preparu afiŝojn, flugfoliojn, banderolon... La grupo pripensu kaj eldonu por partopreni la internacian eventon.



Bernardo anoncas ke nova urbestro estis elektita en Le Haillan. Li skribos al li por nomi novan lokon, ekz. straton, Esperanto aŭ Zamenhof. Inaŭguro de nova Zeo estas okazo por prezenti konferencon.

Klodin' kaj **Rose** disfaldas flagaron donacitan de **Iberla** por ornami budon.



Seán invitas grupanojn partopreni en UKon. de la 1a ĝis 8a de aŭgusto ĉi jare en Graco (Graz- Aŭstrio). UK 2027 en Melburno (Aŭstralio). Por 2028 ĉu Litovio, ĉu Luksemburgio? Jam en 2008 UK okazis en Litovio. Tie aktiva grupo celas atingi la nacian agnoskon de Eo kiel heredaĵo de la homaro.



Post fino de la laborkunveno je la 12h venis tempo por la **verkateĵero**: la eseoj pri "mia plej bela Esperanto-rememoro". Bedaŭrinde pro malsano Luca ne ĉeestas, kaj tial la eseo pri Pri la agnosko de Esperanto fare de UNESKO momente paneas. Male Katja tiel fervore redaktis pri la eksterkongresaj unuaj kontaktoj, ke la verko jam ampleksas pli ol du paĝojn. Ĵanseb kaj Marcelo proponis du versiojn pri la rememoroj de Charles Brunet, la kunredaktantoj provas kombini ambaŭ en unu sama versio.

Post kutima kunpartigo de abundaj manĝaĵoj, inter la 13h kaj la 14h30, venis la atendita poezia posttagmezo. Bernardo rajtas fieri pri la sukceso de tiu evento, kiun la grupanoj aktive kaj plezure partoprenas, sekve al lia propono jam antaŭ multaj jaroj.



*Oficiala afiŝo de la
Printemps des poètes
2026*

Printempo de poetoj 2026

«Libereco, vigliga ŝvebanta forto»

Liberté, force vive, déployée



Klodin' prezentas

Mahtab Ghorbanii

Mahtab Ghorbanii naskiĝis en 1983 en Teherano. Ŝi estas verkistino, poetino kaj aktivulino pri homaj rajtoj, kaj estas rifuĝinto en Francio ekde 2016.

Ŝiaj poemoj laŭdas amon, liberecon, vivon kaj lukton. Ĉi tiu poemo venas el ŝia poemaro:

Neniu mano ekzekutos nian liberecon

La traduko de ĉi tiu libro estis farita en ombro. Pro la politika situacio de la aŭtoro, la tradukistoj estis devigitaj resti anonimaj.

Ĉi tiu silento estas maniero pluvivi en mondo kie ekstremismo kaj *fatvoj* ankoraŭ povas ordoni la mortigon de engaĝitaj poetoj, verkistoj kaj tradukistoj.

Jen unu el ŝiaj poemoj kaj rekta traduko el la farsa al Esperanto proponita de A.I.

Aucune main n'exécutera notre liberté

هیچ دستی آزادی ما را اعدام نخواهد کرد

POÉSIE



تسا نکمم ان تا هناخ هب نتش گرب
تسا هدش کاپ اه مظفاح زا ، عونمم تمان
دشیم همزمز اه چوک رد ینامز هک ، تنابز
هدششومارف یزاوآ لثم ، ی تسه شگن تلد
ینیبیم ار انشأ یاهار یایور اهش
تفرگیم تشوغآ رد هک هناوید یرهش
تسا هتفرگ تشوغآ رد نایاپیب ، دیعبت اما
هدعویب یامدنآ
دندنبیم ار تیاهم خز ی تسود یاهتسد ، یرآ
نافوط لد رد تسی هانپ ناشین ابرهم
یوجتسج رد هک یمیتی نآ وت اما
تسا هدش مگ یردام شوغآ
تسا هشیمه زارتنی گنس بی اغ یناخ ، بشما و
کاخ رد یاهناد ، ییایور ینطو
تسا هدوبن وت نآ زا زگره هک

Reveni al via hejmo estas neeble.
Via nomo estas malpermesita, el la memoroj forviŝita.
Vian lingvon, iam flustritan en la stratetoj,
vi sopiras ĝin kiel forgesitan kanton.

Nokte vi revas pri konataj vojoj,
pri freneza urbo, kiu brakumis vin,
sed ekzilo senfine brakumas vin,
estonteco sen promeso.

Jes, amikaj manoj bandaĝas viajn vundojn,
ilia bonkoreco estas rifuĝo en la mezo de ŝtormo,
sed vi estas tiu orfo
serĉanta la brakumon de perdita patrino.

Kaj ĉi-nokte la forestanta hejmo estas pli peza ol iam.
Revata patrujo, ero da tero,
kiu neniam estis via.

Kaj ĝia franca traduko

Revenir chez toi, impossible,
Ton nom, interdit, effacé des mémoires.
Ta langue, autrefois murmurée dans les ruelles,
te manque comme un chant oublié.
La nuit, tu rêves de routes familières,
de la ville folle qui te berçait,
mais l'exil t'enlace, sans fin,
avenir sans promesse.
Oui, des mains amies pansent tes plaies,
leur tendresse, refuge dans la tempête,
mais tu es cet orphelin
cherchant les bras d'une mère perdue.
Et ce soir, la maison absente pèse plus lourd.
Une patrie rêvée,
grain de terre qui n'a jamais été le tien.

Mi ricevis de A.I. plurajn tradukojn al Esperanto, kiuj celas privilegii:

- muzikecon kaj poezian kontinuecon
- aŭ version pli proksiman al persa ritmo
- kaj fine tradukon inspiritan de « gazalo »

La lasta vekis mian scivolemon

Ĉu vi konas, kio estas « gazalo » (ghazal ou gazel)?

(Inter la ĉeestantoj, nur Elvezio kapablis jese respondis kaj doni pravan difinon)

Kio estas « gazalo »? (« ghazal »)

« Gazalo » estas poezia formo de araba deveno, ofte traktanta amon, perdon kaj nostalgion. Tiu poezia formo tiam iĝis populara en la persa lingvo, kie ĝi prosperis en la 13-a kaj 14-a jarcentoj.

La historio de gazalo fontas el kulturaj interŝanĝoj, adaptadoj kaj transformadoj, ĉar ĝi vojaĝis de Arabio al Irano, Hindio kaj pretere. Ĝia daŭra allogo fontas en ĝia kapablo kapti la kompleksecon de homaj emocioj kaj travivaĵoj tra la beleco de poezio kaj muziko.

En Eŭropo, la persa gazalo unue estis konata per tradukoj en la latinan, germanan, anglan kaj francan. Goethe estis la unua, kiu uzis gazalon en sia lasta grava poezia kolekto (1819): *West-östlicher Divan (Okcident-Orienta divano)*.

Gazalo devas obei striktajn regulojn de kunmetaĵo kun diversaj ritmoj, el 5–16 duversoj, en kiu la dua verso de ĉiu verspareto havas identan rimon.

Ĝenerale, la lasta verspareto devas enhavi aludon aŭ alvokon al la verkinto de la poemo.

Aliaj devigoj ankaŭ devas esti respektitaj. Sed estas sufiĉe multaj poetoj, kiuj liberiĝis de ĉi tiuj devigoj, ĉar malfacilas strikte respekti ilin en ĉiuj lingvoj.

Ne eblas reveni al via hejmo — en ekzilo.

Via vojo finiĝas en polvo — en ekzilo.

Via nomo estas malpermesita, via nomo forviŝita,
eĉ la eĥo de via nomo silentas — en ekzilo.

Via lingvo, ho via lingvo, iam flustris inter stratetoj,
nun ĝi rompiĝas en via gorĝo — en ekzilo.

Nokton post nokto vi revas pri la urbo freneza,
pri brakoj, kiuj vin luladis — en ekzilo.

Sed la urbo ne respondas, la pordoj ne malfermiĝas,
ĉiu pordo restas fermita — en ekzilo.

Jes, manoj amikaj bandaĝas viajn vundojn,
jes, mildo vin ŝirmas momenton — en ekzilo.

Sed vi restas orfo sub fremda ĉielo,
serĉante patrinan ombron — en ekzilo.

Kaj ĉi-nokte la forestanta hejmo pezas pli ol monto,
pli ol silento senfina — en ekzilo.


Ho revata patrujo, grajno da tero inter fingroj,
vi disfalas kiel polvo — en ekzilo.

Ne eblas reveni, ne eblas.

Via koro mem fariĝis fremda — en ekzilo.

Louis Aragon omaĝis la stilon per sia poemo « *Ghazel au fond de la nuit* » - *Le Fou d'Elsa*, 1963

Kelkaj fontoj: Testa versio PIV, Wikipédia, www.larevuedesressources.org/Ghazels-poemes-persans.html



Libereco – forto viva, kiu disvolviĝas

La forto de libereco en la poezio de Lesja Ukrajinka

Katja prelegetas pri

Lesja Ukrajinka (1871–1913)

Lesja Ukrajinka estas plumnomo de **Larisa Petrivna Kosaĉ-Kvitka**. Ŝi estas unu el la plej grandaj poetinoj de Ukrainio - verkistino, dramisto kaj tradukistino.



Ŝi montris sian talenton tre frue: ŝi komencis legi en la aĝo de tri jaroj, je ses - brodi, je naŭ - verki poemojn. Ŝi estis tre edukita kaj multlingva, kaj tradukis eŭropajn verkistojn, inter ili ankaŭ francajn. Malgraŭ grava malsano, ŝi restis forta kaj kreiva. Ŝia verkaro estas plena je kuraĝo, digno kaj interna libereco. Ĝi restas aktuala kaj inspira ankaŭ hodiaŭ.



Contra spem spero!

Гетьте, думи, ви, хмари осінні!
То ж тепера весна золота!
Чи то так у жалю, в голосінні
Проминуть молодії літа?

Ні, я хочу крізь сльози сміятись,
Серед лиха співати пісні,
Без надії таки сподіватись,
Жити хочу! Геть думи сумні!

Я на вбогім сумнім перелозі
Буду сіять барвисті квітки,
Буду сіять квітки на морозі,
Буду лить на них сльози гіркі.

І від сліз тих гарячих розтане
Та кора льодовая, міцна,
Може, квіти зійдуть – і настане
Ще й для мене весела весна.

Я на гору круту крем'яную
Буду камінь важкий підіймать
І, несучи вагу ту страшную,
Буду пісню веселу співать.

В довгу, темную нічку невидну
Не стулю ні на хвилюк очей,
Все шукатиму зірку провідну,
Ясну владарку темних ночей.

Так! я буду крізь сльози сміятись,
Серед лиха співати пісні,
Без надії таки сподіватись,
Буду жити! Геть думи сумні!

[2 травня 1890 р.]

For vi, pensoj, vi, nuboj aŭtunaj!
Orebrilas ja nun primaver'!
Ĉu trapasos la jaroj plej junaj
En plorego kaj plua sufer'?

Mi deziras tra larmoj nur ridi,
Kanti meze de trist' kaj dolor',
Sen esper', tamen volas mi fidi,
Volas vivi! El kor' triston for!

Mi sur povra kaj eta parcelo
Plantos florojn de bunta kolor',
Plantos florojn dum vintro, dum frosto,
Verŝos larmojn por ĉiu flor'.

Kaj degelos de larmoj ĉi varmaj
Glacikrusto fortika sur ter',
Eble, ĝermos la floroj plej ĉarmaj,
Venos gaja por mi primaver'.

Mi sur monton silikan, plej krutan
Levos supren la ŝtonon post ŝton',
Kaj, portante la pezon teruran
Kantos mi kun la ĝoja reson'.

Kaj dum nokto tre longa, senhela
Mi ne fermos okulojn, ĉar
Serĉos mi vojmontrantan stelon,
La reĝinon de l' tuta stelar'.

Jes! Mi volas tra larmoj nur ridi,
Kanti meze de trist' kaj dolor',
Sen esper', tamen volas mi fidi,
Vivos mi! El la kor' triston for!


(2an de aprilo 1890)



Signifo de la poemo

- ◆ Interna libero
- ◆ Kuraĝo spite al malfacilaĵoj
- ◆ Persona rezisto

- ◆ Aludo en la poemo. La mito de Sizifo el la greka mitologio:
 - Senfina kaj tre malfacila laboro
 - “Sizifa laboro” — peniga kaj ŝajne senfrukta
- 👉 Malgraŭ tio — ne rezigni
- 👉 Iri al sia celo



Sizifo laŭ Ticiano



Seán laŭiras padon, ĉu la ĝustan?


La vojo, **La Misvojo,**
de Ludoviko Zamenhof **de Fernando Redondo Ituarte**

Tra densa mallumo briletas la celo,
Al kiu kuraĝe ni iras.
Simile al stelo en nokta ĉielo,
Al ni la direkton ĝi diras.
Kaj nin ne timigas la noktaj fantomoj,
Nek batoj de l' sorto, nek mokoj de l' homoj,
Ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita
Ĝi estas, la voj' elektita.

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante
Ni iru la vojon celitan!
Eĉ guto malgranda, konstante frapante,
Traboras la monton granitan.
L'espero, l'obstino kaj la pacienco—
Jen estas la signoj, per kies potenco
Ni paŝo post paŝo, post longa laboro,
Atingos la celon en gloro.

Post densa mallumo ekzistas abismo,
Al kiu la lingvo rapidas ;
Ni semas malfidon per simpla sofismo,
Kaj certan disfalon ni vidas.
Kaj nin ne konvinkos eĉ pruvoj po miloj,
Aŭ klaraj rezonoj, aŭ bonaj konsiloj,
Ĉar ĉiel malhelpi jam de la komenco
Ni celas kun firma intenco.

Nur fuŝa, malbela, sen ia sukceso,
Ni vidas nepropran laboron.
Eĉ guto acida, falante sen ĉeso,
Doloras plej gajan la koron.
La moko, la rido, la indiferento,
Jen estas la iloj, en ĉiu momento,
Per kiuj ni provas, verŝante sarkasmon,
Velkigi la entuziasmon.



Ni plendas kaj plendas, neniam laciĝas,
Pri l' tempoj pasintaj pensante ;
Cent horoj perdiĝas, mil horoj perdiĝas,
Ni plendas kaj plendas konstante.
« Laboru kaj fidu ! » la homoj nin petas,
« Neniam ! » en ĥoro ni krie ripetas,
Obstine gruntante – neniu nin dankos,
Sed tamen la plendoj ne mankos.

Ni semas kaj semas, neniam laciĝas,
Pri l' tempoj estontaj pensante.
Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas,—
Ni semas kaj semas konstante.
"Ho, ĉesu!" mokante la homoj admonas,—
"Ne ĉesu, ne ĉesu!" en kor' al ni sonas :
"Obstine antaŭen! La nepoj vin benos,
Se vi pacience eltenos".

Se longa sekeco aŭ ventoj subitaj
Velkintajn foliojn disŝetas,
Ni helpas la venton, kaj, refortigitaj,
Ni planan disfalon profetas.
Eĉ kiam la krizo jam estas pasinta,
Kaj fido en koron denove veninta,
Obstine ni tedas per malpropagando
La homojn tra tuta la lando.

Se longa sekeco aŭ ventoj subitaj
Velkantajn foliojn deŝiras,
Ni dankas la venton, kaj, repurigitaj,
Ni forton pli freŝan akiras.
Ne mortos jam nia bravega anaro,
Ĝin jam ne timigas la vento, nek staro,
Obstine ĝi paŝas, provita, hardita,
Al cel' unu fojon signita!

Nur fuŝa, malbela, sen ia sukceso,
Ni vidas nepropran laboron.
Eĉ guto acida, falante sen ĉeso,
Doloras plej gajan la koron.
La moko, la rido, la indiferento,
Jen estas la iloj, en ĉiu momento,
Per kiuj ni provas, verŝante sarkasmon,
Velkigi la entuziasmon.

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante
Ni iru la vojon celitan!
Eĉ guto malgranda, konstante frapante,
Traboras la monton granitan.
L' espero, l' obstino kaj la pacienco,—
Jen estas la signoj, per kies potenco
Ni paŝo post paŝo, post longa laboro,
Atingos la celon en gloro.



https://www.youtube.com/watch?v=wreCtYG_IUA

Seán el la "Esperanta Antologio"
Poemoj 1887-1981. - Rotterdam UEA 1984.
Jen du etajn partojn de longa poemo de
Kálmán Kalocsay,


Kongresa Runo

1. « Miri venis mi miraklon :
Patrolingvon de la Mondo :
Lingvon, kiu liutsone,
Lule ludas sur la lipoj,
Flate, flustre, flirte flugas,
Dolĉon donas dorlotante,
Muĝas kiel mar' majesta,
Kun titana tono tondras:
Ideala, inda ilo,
Instrumento konkuranta
Kun la kordoj de l' kantelo.....



2. Am-armeo ! Amasiĝu !
Armuj vin per arda amo !
Festu frate kun la filoj,
Kaj sen laco laboradu !
Luktu firme, fajre, forte
Kaj sufoke kaptu kole
Tiun urson ulno-ungan,
Monstron de la Mortolando,
La militon malicegan. »

Ezope saĝumas **Olivier**
dank' al **Kálmán Kalocsay**



Libero

Liberon plenan ĝuis iam la ĉeval'
laŭplaĉe kuradis en la kampo, tra la val'.

Alvenis foje kaj ofendis ĝin la cerv'
per malklarigo de fonto kaj huftreto de harb'.

Ĝi volis venĝi, sed kun pli rapida sving'
la cervo kuris: ĝi fiaskis pri l' ating'.

Kolero en ĝi bolis, kaj ĝi, en impet'
nun al la homo turnis sin kun helpopet'.

Ĉi tiu diris: "Bone, la cervon ĉasos mi,
se bridon, selon al vi meti lasos vi."

La cervon murdis la ĉasist' per lancotraf',
sed la ĉeval' por ĉiam iĝis lia sklav'.



Rose rozumas
kun **Raymond Schwartz**:


La rozo

Estis ŝi vivplena floro
kaj ŝi dolĉe bonodoris,
ĉarma estis la koloro
kaj mi pie ŝin adoris.

Nur feino ŝin ornamis
kaj ŝin per feliĉo benis, -
Ĉu mirige? mi ekamis...
Kaj l' amatan mi forprenis...



dum **Bernardo** el la sama verko
La Verdkata testamento (1926)
optimisme esprimas sian
pacemon.



Plej facila sur la tero

Plej facila sur la tero
Estas kanto pri l'espero.

Nia lingvo estas kara
Kaj por rimi senkompara.

Tial "verku" do sentime
kaj ekzemple diru rime :

"Restos ĉiam mi sen laco
Ano de l' tutmonda paco !"

La homaro vin komprenos
Kaj ĝi Esperanton benos.

Tiam en la mondo ĉio
Estos ronda familio !

Elvezio per sia traduko vojaĝigas nin
ĉe **Nadja Anjuman**

Filino el Afganiŝtano

*el la persa tradukita en la franĉan de
Franĉk Merger kaj Niloufar Sadighi*

Neniel deziras mi malfermi mian
buŝon : kion povas mi kanti?
Malamata de mia tempo: kion mi
povas kanti?
Ne plu mielo, sed veneno sur miaj
lipoj: kion povas mi kanti?
Malbeninda pugno de la tirano sur
mia frakasita buŝo



Neniu partigas mian ĉagrenon en tiu ĉi mondo, neniun povas mi
brakumi,

Al kio utilas ridi aŭ paroli, vivi aŭ plori?

En malliberejo, en kaĝo sen ĝojo, sen espero kaj sen deziro

Al kio utilas esti naskiĝinta por ke oni min buŝoŝtopigu?

Jes, oh mia kor', jen la printempo kun sia sinsekvo da plezuroj,
tamen tiu, kies flugiloj estas kunligitaj, kiel povas li flugi?

Longtempe silentis mi, sed la arton kanti mi ne forgesis

Mia koro, dume, mallaŭte kantetis

lun ĝojan tagon, mi scias, miajn
barilojn rompos mi

Por fuĝi tiun solecon kaj ĝojebria
kanti

Ne estas mi tremanta poplo en
malfortika vento

Mi estas filino el Afganiŝtano, mi
naskiĝis por ellasi mian malgajan
kanton.



Marcelo ĉerpis poezion el Koreio
renkonte al **Kim Mingi**
kaj **Choe Taesok** (Ŝtonego)



Kim Mingi (1951-2024) estis korea kantisto. Li grave influis la korean scenejarton kaj la Pordemokratian Movadon. Dum la prema militista periodo li subtenis la junulajn kaj popolajn ribelojn, kaj tial li pasigis plurajn jarojn en karceroj de la diktatoroj. La arto de Kim Min-gi estas karakterizita de lia kapablo

kapti la profundajn emociojn de sia popolo en lirikaj kaj metaforaj manieroj, eĉ kiam rekta politika esprimo estis malpermesita. Lia dumviva engaĝiĝo al socia justeco, libereco kaj paco fariĝis ne nur parto de lia muziko, sed ankaŭ parto de lia heredaĵo kiel artisto.

Choe Taesok (Alinome Ŝtonego)

Naskiĝis en 1962. Li esperantistiĝis en 1981 kaj ekde la mezo de la 1990-aj jaroj loĝas en Vilno, Litovio.

Ĵurnalisto, li estas ankaŭ korealingva lektoro de la Vilna universitato, eklezia Esperanto-tradukisto de ŭonbulismo, prizorganto de ĝia oficiala esperantlingva retejo, korespondanto de pluraj koreaj televido kaj radioj kaj de koreaj gazetoj.

Krome, li estas membro de la Lingva Komitato, kaj multjara provleganto de la revuo *Pola Esperantisto*. Kaj li fintradukis la romanon de la korea nobelpremiito - "Venas la Knabo", kiu traktas la 18an de Majo.



Ĉiamverda arbo

Rigardu en la kamp' verdan pinon vi;
ne estas ajna hom', kiu zorgas ĝin.
Blovas pluvovent', batas neĝoŝtorm',
sed plene verdas ĝi ĝis la fin' de l' mond'.

Pasintaj tagoj jam kun amar' kaj trist'
neniam venu plu ree do al ni,
tial ŝvitos ni, komprenigos ni;
sur tiu kruda kamp' iĝos pino ni.

Eĉ kvankam havas nun tre malmulte ni,
la manon en la man' kune larmas ni.
Foras nia voj', malebenas ĝi,
sed iros ni kun sci', venkos ni ĉe l' fin'.



Matena roso

Metiĝas matenros'
Kun perla belkolor'
Post longa la malluma nokt'
Sur ĉiu herba foli'.

Jen la suno sur tombej'
Ekflamas nun la pomp'.
Mi eltenos la provon plu
En varmega la sufer'.

Mil gutoj da malĝoj'
ekrosas en la kor'
kaj mi ridetas sur montet'
en hela matena radi'.

Nu mi ek al la eben'
Al la sovaĝa kamp'.
Forlasu triston el la kor',
Mi marŝu kun esper'.




Analizo de la Kanto "Matena roso" de Kim Min-gi

En la korea : 아침 이슬 (아침이슬)

En la angla : Morning dew

Ĝenerala Priskribo de la Temo



"Matena roso" de Kim Min-gi estas unu el la plej ikonecaj kaj politike ŝarĝitaj kantoj el la korea protestkulturo de la 1970-aj jaroj. Komponita en tempo de politika subpremo, la kanto estas simbolo de rezisto kontraŭ la milita diktaturo, reprezentante pacajn protestojn kaj la deziron de la korea popolo por libereco kaj socia justeco. Kvankam la kanto ne mencias rekte politikajn temojn, ĝia metafora lingvaĵo kaj profunda emocia tono igis ĝin himno por generacio, kiu sopiris al ŝanĝo.

La titolo mem, "Matena roso," implicas puriĝon kaj renaskiĝon post malhela nokto, simbolo de nova espero post periodo de subpremo kaj sufero. La kanto, per simplaj kaj natur-inspirataj bildoj, kaptas la ciklon de doloro kaj espero, kiu karakterizas sociajn movadojn tra la tuta mondo.

Detala analizo de ĉiu strofo

Unua Strofo

La kanto malfermiĝas per la sperto de sentoj, simboligante vekigiĝon al la reala mondo. La matena roso estas simbolo de freŝeco kaj renoviĝo, sed ankaŭ de frua, malvarmeta mateno post longa nokto. La maniero kiel la roso tuŝas la piedojn kaj manojn aludas al la profunda ligo inter la homaro kaj la naturo, kaj la komenco de vekigiĝo post tempo de malfacileco aŭ dormo. Ĉi tiu vekigiĝo povus esti rigardata kiel la vekigiĝo de konscio pri la politika kaj socia realaĵo.

Dua Strofo

Ĉi tiu strofo ilustras la doloron kaj suferon de la antaŭa nokto. La nokto povas esti metaforo por la epoko de subpremo aŭ milito, kaj la ploroj en la herbo reprezentas la spurojn de la suferado, kiu daŭris dum la tuta tempo. Tamen, ĉar ĉi tiuj ploroj estas parto de la naturo, ĝi sugestas, ke ĉi tiu doloro estas io, kion ĉiuj devas trapasi, kaj ke ĝi fine malaperos kun la leviĝo de la suno – la simbolo de nova tago kaj nova komenco.

Tria Strofo

La sunleviĝo simbolas esperon kaj renovigon. Ĝi povas esti rigardata kiel promeso de pli bona estonteco post la doloro kaj sufero de la pasinteco. Vizaĝoj kovritaj per larmoj montras la homan suferon, sed ankaŭ la eblecon de resaniĝo. En ĉi tiu strofo, la suno estas ankaŭ simbolo de libereco kaj paco, kiuj, kiel la sunleviĝo, povas venki la malhelajn tagojn de subpremo.

Kvara Strofo

La "marŝo tra la tero" povus esti aludo al la neniam finiĝanta batalo por justeco kaj libereco. Ĝi montras ke la homoj, eĉ post travivado de doloro kaj sufero, devas daŭre labori por pli bona mondo. Ĉi tiu strofo estas instigo al la aŭskultantoj ne rezigni, sed daŭrigi la vojon malgraŭ la malfacilaĵoj.

La fina strofo ripetas la temon de renovigo kaj espero. Ĉi tiu mesaĝo resonas kun la spiritaj kaj emociaj bataloj, kiujn homoj frontas en subpremataj socioj, kaj ĝi estas invito kredi je la ciklo de espero kaj rezisto.

Konkludo

"Matena roso" de Kim Min-gi ne estas nur simpla kanto pri naturo kaj emocioj, sed profunda simbolo de politika kaj socia rezisto. Ĉiu strofo estas plena de metaforoj, kiuj ligas la naturon kun la homa sperto de doloro, sufero, kaj fina espero. La matena roso reprezentas la renoviĝon, kiun multaj serĉis dum periodo de granda politika subpremo en Koreio.

Por tiuj, kiuj jam konas la kanton "Matena roso", estas invito malkovri aliajn samtempajn kanzonojn de Kim Min-gi, kiel "Song of My Land" kaj "Vojo" kiuj ankaŭ kaptas la esencon de la korea rezista spirito. Lia laboro ne nur inspiris generaciojn da protestantoj en Koreio, sed daŭre resonas tra la mondo kiel simbola mesaĝo pri la potenco de espero kaj rezisto.

Finfine, ni honoru la dumvivan engaĝiĝon de Kim Min-gi al la batalo por libereco kaj paco, kaj ni neniam forgesu, ke eĉ post la plej mallonga nokto, la matena roso ĉiam venos.





**ESTRARO de
«ESPÉRANTO-GIRONDE»**

* * * * *

Adreso ĉe la prezidanto

* * * * *

Prezidanto: **Elvezio CANONICA**

Université de Bordeaux Montaigne -UFR Langues,
Domaine Universitaire, Esplanade des Antilles, 33600 Pessac
Tel: 06 72 17 22 97 / canonica.elvezio@orange.fr

Vic-Prezidanto: **Seán Ó RIAIN**

Sean.ORiain@Dfa.ie

Sekretariino: **Janine DUMOULIN**

Tel: 05 46 49 07 46 / janinedum@neuf.fr

Kasisto: **Yannick DUMOULIN**

2, chemin des Nauves - Chardes - 17130 MONTENDRE
Tel: 06 84 11 26 95 / yannickdum@aol.com

* * * * *

**Kontribuojn por LEGLI bv. sendi al janinedum@neuf.fr
aŭ al esperanto.gironde@free.fr**

La **venontaj kunvenoj** de **ESPERANTO-GIRONDE**

okazos de la 10a30 ĝis la 16a horo

ĜENERALA ASEMBLEO

**en Salle de Toctoucau - Avenue G. Pelletier 33600 Pessac
Dimanĉon 26an de aprilo**

kaj sekve en nia nun kutima kunvenejo:

salle du Bourg - 28 avenue Roger Cohé 33600 Pessac

**Dimanĉon 24an de majo
Dimanĉon 28an de junio**

